

Annette von Droste-  
Hülshoff,

Lastaj vortoj (1)

*tradukita de Manfredo  
Ratislavo*

*1a traduk-versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru  
vi;  
Ĉar lumas jen en paco  
Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj dolo-  
ro  
Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia  
Pac' tuŝas tiun mondon  
ĉi,  
Ne pensu plu pri tombo  
mia,  
Vin de l' stelar' salutas  
mi.<sup>2</sup>

...

Annette von Droste-Hülshoff,

Lastaj vortoj (0)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Laiŭvorta Esperantigo*

Amatoj, kiam forpasis mia spirito,  
ne postploru min per iu larmo;  
ĉar tie, kie mi restadas, tie estas paco,  
tie lumas al mi eterna tago.

Tie, kie ĉiu ter-aflikto estas malaperinta,  
ne foriĝu via bildo al mi,  
kaj mildigon por viaj vundoj,  
por via doloro volas mi elpetegi.

Se dum la nokto blove svingas siajn seraf-  
flugilojn  
la paco super la mondo-regnon,  
ne pensu tiam plu pri mia tombo,  
ĉar el la stela spaco mi salutas vin.

...

Annette von Droste-  
Hülshoff,

Lastaj vortoj (2)

*tradukita de Manfred  
Retzlaff*

*2a versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru  
vi;  
Ĉar lumas jen en paco  
Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj dolo-  
ro  
Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia  
La nokta paco al la Ter',  
Ne pensu plu pri tombo  
mia,  
Salutas mi el stela sfer'.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05.15.*

*Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)*

*La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, baumann@drostegesellschaft.de, www.drostegesellschaft.de) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*Arg-160-475 (2004-05-16 17:17:06)*

*Proksimuma laŭvorta Esperantigo de la origina germana-lingva teksto*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)*

*La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer'". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.*